
panjo – mamãe

renkonti – encontrar; conhecer

ŝati – gostar de

sed – mas; porém

Teksto 6

Mark: Jen estas mia panjo.
Ana: Agrable renkonti vin.
Patrino de Mark: Saluton, Ana!
Ana: Saluton!
Mark: Jen mia paĉjo. Li nomiĝas Kristofer. Sed multaj nomas lin Kriĉjo.
Ana: Saluton, Kristofer!
Patro de Mark: Agrable renkonti vin, Ana. Diru Kriĉjo, mi petas.
Mark: Ankaŭ estas kato en nia familio.
Ana: Kiel ĝi nomiĝas?
Mark: Ĝi nomiĝas Zap.
Ana: Bela vi estas Zap.
Zap: Mjaŭ.
Mark: Li jam ŝatas vin.
Ana: Bonege. Mi jam ŝatas lin.
Mark: Ĉu vi havas katon?
Ana: Ne, sed mi ŝatus havi katon.
Mark: Kial vi ne havas katon?
Ana: Ĉar miaj gepatroj ne volas havi katon.
Mark: Mi komprenas.
Ana: Ĉu vi havas ankaŭ hundon?
Mark: Ne nun. En Svislando ni havis hundon.

Questionário Texto 6:

- 1) Kiel nomiĝas la patrino de Mark?
- 2) Kio estas la nomo de la kato de Mark?
- 3) Ĉu Ana ŝatus havi katon?
- 4) Kial Ana ne havas katon?
- 5) Kio okazis pri la hundo de Mark?
- 6) Kiel nomiĝis la hundo de Mark?
- 7) Ĉu vi preferas katon aŭ hundon? Kial?

Punktoj Gramatikaj:

01) -NJ-: Sufixo que indica o diminutivo de carinho para nomes femininos. Geralmente se adiciona o sufixo a uma forma reduzida da palavra de uma a cinco letras. Ex.:

patrino – pa**NJo**
fratino – fra**NJo**

An(n)a – A(n)**NJo**
onklino – o**NJo**

Maria – Ma**NJo**
Sofia – So**NJo**

02) -ĈJ-: Sufixo que indica o diminutivo de carinho para nomes masculinos. Como em **-nj-**, geralmente se adiciona o sufixo a uma forma reduzida da palavra de uma a cinco letras. Ex.:

patro – pa**ĈJo**
frato – fra**ĈJo**

Kristofer – Kri**ĈJo**
onklo – o**ĈJo**

Johano – Jo**ĈJo**
Ludoviko – Ludo**ĈJo**

03) kial – ĉar: Perguntas que começam com “**kial**” devem ser respondidas com “**ĉar**”. Ex.:

- **Kial** vi venis? (Por que você veio?)
- **Kial** vi ne havas katon? (Por que você não tem gato?)

Ĉar mi volis. (Porque eu quis.)
Ĉar mi estas alergia kontraŭ katoj. (Porque sou alérgico a gatos.)

• **Kial** vi ekdormis? (Porque você adormeceu?)

Ĉar mi estis tre laca. (Porque eu estava muito cansado.)

03) Para um cão, um gato ou qualquer outro animal, o pronome **ĝi** é utilizado, porém poderá ser utilizado **li** ou **ŝi**, também.

04) JEN – O advérbio “**jen**” significa “eis”, “eis aqui”, “eis aí”, “eis ali”, “voilà”, “eis que”, “o seguinte”. O uso de **jen** é flexível; pode-se dizer *Jen mia frato* ou *Jen estas mia frato* (Eis meu irmão). Ex:

- | | |
|---|------------------------------------|
| • Jen mi estas! | Eis-me aqui! |
| • Jen Ofelio perdis la prudenton! | Eis que Ofélia perdeu a prudência! |
| • Jen la ĝusta tempo por vidi lin. | Eis a hora certa para vê-lo. |
| • Mi diros al vi la jenon : | Eu direi a você o seguinte: |

05) -EC-: Sufixo que indica ideia abstrata de uma qualidade ou de um estado:

- bela (belo) → bel**EC**o (beleza)
- bona (bom) → bon**EC**o (bondade)
- facila (fácil) → facil**EC**o (facilidade)
- acida (ácido) → acid**EC**o (acidez)
- heroo (herói) → hero**EC**o (heroísmo)
- sklavo (escravo) → sklav**EC**o (escravidão)

Observação: Com materiais “**eca**” significa “do mesmo aspecto”; “semelhante a”:

- vitro (vidro) → vitr**EC**a rigardo (olhar vítreo)
- silko (seda) → silk**EC**a ĉemizo (camisa com o aspecto de seda)

ECo (qualidade; característica)

EXERCÍCIOS

01 – Responda:

- a) Kial vi lernas Esperanton?
- b) Ĉu vi trinkas bieron? Kial? Kial ne?
- c) Ĉu vi studas? Kion vi studas? (*Juron, Internaciajn Rilatojn, Historion, Socialan Asistadon*)?
- c) Kial vi studas ... ?
- d) Kiujn aliajn lingvojn vi volas lerni? Kial?
- e) Ĉu vi havas dorlotbeston? Kial? Kial ne?

02 – Tendo as seguintes palavras, forme substantivos abstratos com **-EC-**:

- a) amiko → _____
- b) inteligenta → _____
- c) ĉiam → _____
- c) ofte → _____
- d) riĉa → _____
- e) blanka → _____

03 – Traduza o texto 6.

Leciono 7 – LA FAMILIO DE ANA

Vortareto:

aĝa – de idade; idoso; velho
apartamento – apartamento
ĉambro – quarto; cômodo
da – de (quantidade)
do – portanto; pois; então
dormi – dormir
entute – em suma; ao todo

fakte – de fato
ĝemeloj – gêmeos
ja – na verdade; sem dúvida
kiom – quanto(s)
kuirejo – cozinha
necesejo – banheiro
ol – do que

plej – o mais
pli – mais
posedi – possuir
salono – sala de estar
samaĝa – de mesma idade
simili – assemelhar-se

Teksto 7

Jen mia familio!

En mia familio estas kvin personoj. Estas mi, mia patrino kaj mia patro. Mi havas ankaŭ fraton kaj fratinon. Mi do havas du gefratojn. Ili estas pli junaj ol mi. Mia patrino estas la plej aĝa en nia familio. Miaj gepatroj posedas apartamenton. En ĝi ni loĝas. Ĝi havas dormoĉambrojn, salonon, kuirejon, kaj necesejon. Do, entute estas ses ĉambroj. Mi havas mian ĉambron kaj miaj gefratoj havas sian ĉambron. Miaj gefratoj tre similas. Ili fakte estas ĝemeloj. Mia fratino havas dek du jarojn. Kiom da jaroj havas mia frato? Ankaŭ dek du. Ĝemeloj ja estas samaĝaj.

Questionário Texto 7:

- 1) Kiom da gefratoj havas Ana?
- 2) Ĉu la familio de Ana loĝas en propra domo?
- 3) Kial la gefratoj de Ana estas samaĝaj?
- 4) Ĉu vi havas gefratojn?
- 5) Kiom da ĉambroj havas via apartamento / domo?
- 6) Ĉu vi estas la plej juna en via familio?
- 7) Kiu estas la plej maljuna en via familio?
- 8) Parolu pri via familio.

Punktoj Gramatikaj:

01) Comparativo e Superlativo: A formação do *Comparativo* e do *Superlativo* dos adjetivos e advérbios em Esperanto forma-se da seguinte forma:

a) pli ... ol ...: Forma usada para formar o **comparativo**. Ex.:

- | | |
|--|-------------------------------------|
| • Mi estas PLI alta OL vi. | Sou mais alto (do) que você. |
| • Ŝi estas PLI forta OL li. | Ela é mais forte (do) que ele. |
| • Mi ŝatus havi PLI . | Eu gostaria de ter mais. |
| • Karlo estas PLI bona OL Petro. | Carlos é melhor (do) que Pedro. |
| • Johana kantas PLI malbone OL Suzana. | Joana canta pior que Suzana. |
| • Diego kuras PLI rapide OL Renato. | Diego corre mais rápido que Renato. |

b) la plej ... el ...: Forma usada para formar o **superlativo**. Ex.:

- | | |
|---|------------------------------------|
| • Mi estas LA PLEJ alta EL ni. | Sou o mais alto entre nós. |
| • Pipi estas LA PLEJ forta en la tuta mondo. | Pipi é o mais forte do mundo todo. |
| • Karlo estas LA PLEJ bona EL la grupo. | Carlos é o melhor do grupo. |
| • Ŝi dancas PLEJ bone. | Ela dança melhor. |

• Peĉjo skribas **PLEJ** bele.

Pedrinho escreve mais bonito.

02) -EJ-: Sufixo usado para denotar lugares. Usado em raízes substantivas e verbais. Ex.:

• hundo (cão)	–	hund EJo (canil)
• laboro (trabalho)	–	labor EJo (local do trabalho)
• ofico (ofício / emprego)	–	ofic EJo (escritório)
• kuiri (cozinhar)	–	kuir EJo (cozinha)
• lerni (aprender)	–	lern EJo (escola)
• vendi (vender)	–	vend EJo (loja)

03) GE-: Prefixo usado para indicar ambos os sexos. Ex.:

GE patroj	–	pais: pai e mãe	GE filoj	–	filhos: filhos e filhas
GE amikoj	–	amigos: amigos e amigas	GE edzroj	–	casal (marido e mulher)
GE sinjoroj	–	senhores e senhoras	GE iĝi	–	acasalar-se
GE fratoj	–	irmãos: irmãos e irmãs			

GEa – para ambos os sexos; misto; unissex

Observação: Algumas pessoas sentem que é importante dizer **gejunuloj** e **geamikoj** ao invés de **junuloj** e **amikoj**, para enfatizar que ambos os sexos estão incluídos. Outras usam as palavras **amikoj** e **junuloj** em uma forma de gênero neutro.)

04) Kiom da ...?: Usado para perguntar sobre quantidade. Ex.:

• Kiom da jaroj vi havas?	Quantos anos você tem?
• Kiom da mono mi ŝaldas al vi?	Quanto dinheiro devo a você?
• Kiom da fingroj vi havas je unu mano?	Quantos dedos você em uma mão.

Observações:

1) A terminação **-N** nunca é usada após a preposição **da**. Por exemplo, ao invés de **Kiom da jarojN vi havas?**, deve-se usar *Kiom da jaroj vi havas?* (Quantos anos você tem?).

Ao invés de **Mi havas multe da monoN**, o correto é *Mi havas multe da mono* (Eu tenho muito dinheiro).

A oração “*Mi havas multon da mono*” é correta, mas “*Mi havas multe da mono*” é mais comum.

2) Repare na diferenças entre: **Kiom da suko vi volas?** (Quanto suco você quer?) e **Kiom vi volas?** (Quanto você quer?).

05) -ER-: Sufixo que indica elemento de um todo; unidade:

- sablo (areia) → sabl**ERo** (grão de areia)
- neĝo (neve) → neĝ**ERo** (flocos de neve)
- fajro (fogo) → fajr**ERo** (faísca; fagulha)
- mono (dinheiro) → mon**ERo** (moeda)
- sango (sangue) → sang**ERo** (gota de sangue)

Ero (elemento; partícula)

EXERCÍCIOS

01 – Traduza as seguintes orações prestando atenção ao uso do sufixo **-EJ**:

- a) Mia paĉjo ŝatas konversacii en la drinkejo kun siaj amikoj. (*drinki – beber bebida alcoólica*)
- b) La gefianĉoj serĉas loĝejon. (*loĝi – morar*)
- c) Ĉu vi iras al la preĝejo ĉiu-dimanĉe? (*preĝi – orar, rezar*)
- d) Multe da malliberuloj forkuris laste semajnfine el la malliberejo. (*libera – livre*)
- e) Kion vi faras en la kuirejo? (*kui – cozinhar*)
- f) La patrino iris al la viandejo. (*viando – carne*)

02 – Crie palavras usando o sufixo **-ER-**, traduzindo logo em seguida:

- | | | | | | |
|----------------|---|-------|---------------------|---|-------|
| a) salo (sal) | → | _____ | d) ligno (madeira) | → | _____ |
| b) akvo (água) | → | _____ | e) kudri (costurar) | → | _____ |
| c) pano (pão) | → | _____ | f) pluvo (chuva) | → | _____ |

03 – Responda:

- a) Kiom da gelernantoj estas en la klasĉambro?
- b) Kiom estas dudek plus dek du?
- c) Kiom estas 100 minus sepdek?
- d) Kiom estas ok dividite per kvar?
- e) Kiom estas dekoble dek?⁸
- f) Kiu estas la plej grava persono laŭ vi?
- g) kiu lingvo estas pli facila, la angla aŭ Esperanto?
- h) Kiu lingvo estas la plej facila, la angla, la franca aŭ la germana?

04 – Observe as informações de 3 hotéis:

HOTELO VILAĜO

- ✓ Romo, Italio
- ✓ Konstruita en 1950
- ✓ 80 ĉambroj
- ✓ De \$420 ĝis \$700 ĉiun nokton
- ✓ Unu trinkejo kaj restoracio
- ✓ 40 minutojn el flughaveno per taksio

HOTELO BONA ESPERO

- ✓ Londono, Anglio
- ✓ Konstruita en 1985
- ✓ 100 ĉambroj
- ✓ De \$200 ĝis \$620 ĉiun nokton
- ✓ du trinkejoj kaj restoracioj
- ✓ 50 minutojn el flughaveno per buso

HOTELO ESPERANTO

- ✓ Vaŝingtono, Usono
- ✓ Konstruita en 1992
- ✓ 10 ĉambroj
- ✓ De \$660 ĝis \$750 ĉiun nokton
- ✓ Unu trinkejo kaj restoracio
- ✓ 50 horojn el flughaveno per aviadilo

⁸ O Esperanto faz uso de um sufixo especial que expressa um múltiplo de um número: **-OBL** ligado a um número. Usado como substantivo, o número com **-OBL** expressa **dobro, triplo** ... Para a multiplicação, usamos a forma de advérbio **-OBLE**: **duoble** ses estas dek du (2 x 6 = 12).

False (F) aŭ Vere (V)?

- a) () La Hotelo Vilaĝo estas pli malmultekosta ol la Hotelo Bona Espero.
- b) () La Hotelo Esperanto estas la plej multekosta el la tri.
- c) () La Hotelo Vilaĝo estas pli nova ol la Hotelo Bona Espero.
- d) () La Hotelo Bona Espero estas la plej nova hotelo.
- e) () La Hotelo Esperanto estas la plej malgranda hotelo.
- f) () La Hotelo Esperanto estas pli proksima al la flughaveno ol la Hotelo Bona Espero.
- g) () La Hotelo Bona Espero estas la plej malproksima al la flughaveno.
- h) () La Hotelo Vilaĝo estas pli granda ol la Hotelo Bona Espero.

05 – Traduza o texto 7

Leciono 8 – KIU ESTAS MARK?

Vortareto:

afero – coisa

antaŭe – anteriormente

certi – estar certo

ĉe – na casa de

diversaj – vários

eble – talvez

el – de (proveniência)

franca – francês

germana – alemão

ĝoji – alegrar-se

hieraŭ – ontem

ia – algum tipo de

itala – italiano

kiu – qual

knabo – garoto

komenci – começar

krom – além de

lernejo – escola

lingvo – língua

nacio – nação

paroli – falar

posttagmeze – à tarde

prave – justamente; com razão

pri – sobre; a respeito de

romanca – Romanche

semestro – semestre

trovi – encontrar

veni - vir

Teksto 8

Panjo: Kion vi faris posttagmeze?

Ana: Mi estis ĉe Mark.

Panjo: Kiu estas Mark?

Ana: Li estas nova knabo en mia lernejo.

Panjo: Bone. Ĉu vi ŝatis esti ĉe li?

Ana: Jes, ni agrable parolis pri diversaj aferoj.

Panjo: Mi ĝojas, ke vi trovis novan amikon.

Ana: Ankaŭ mi ĝojas pri tio.

Panjo: Kial li komencis en via lernejo meze de la semestro?

Ana: Liaj gepatroj trovis bonan laboron ĉi tie. Ili estas iaj diplomatoj.

Panjo: Mi komprenas. Ili antaŭe loĝis en alia urbo, ĉu?

Ana: Jes, en Ĝenevo.

Panjo: Do, ili venas el Svislando en Eŭropo.

Ana: Jes, prave.

Panjo: Ĉu vi scias, kiom da naciaj lingvoj ekzistas en Svislando?

Ana: Ne. Mi ne certas. Ĉu eble du? La franca kaj la germana.

Panjo: Estas kvar naciaj lingvoj en Svislando!

Ana: Kiuj krom la franca kaj la germana?

Panjo: Ankaŭ la itala kaj la romanca.

Ana: Interese!

Questionário Texto 8:

- 1) Kial la panjo de Ana ĝojas?
- 2) Kio estas Ĝenevo?
- 3) En kiu mondoparto estas Svislando?
- 4) Ĉu Ana scias, kiuj estas la oficialaj lingvoj de Svislando?
- 5) Kiuj estas la oficialaj lingvoj de Svislando?
- 6) Kion vi faris hodiaŭ / hieraŭ?

Punktoj Gramatikaj:

Observações:

1) A palavra “**ĉi**” exprime proximidade e é usada com palavras correlativas formadas por **ti-** e **ĉi-**, antes ou depois delas:

- **ĉi tie** ou **tie ĉi** – aqui
- **ĉi tiu** ou **tiu ĉi** – este
- **ĉi ĉio** ou **ĉio ĉi** – tudo isto

2) A palavra **ajn** significa *quer que seja* (aumenta a indefinição de algo já indefinido):

- kiam **ajn** – quando quer que seja; seja quando for
- kiu **ajn** – quem quer que seja; seja quem for

3) As palavras com **ki-** são usadas também como palavras relativas (que relacionam):

- | | | |
|---|---|---|
| • Tio, kio li diris, estas vera. | – | aquilo (isso), que ele disse é verdade. |
| • La knabino, kiu staras tie. | – | a menina, a qual está ali de pé. |
| • Ĝi estas granda kiel domo | – | Ele é grande como uma casa |

4) A terminação **-a** é usada para os nomes de línguas; quase todas as línguas têm uma forma em **-a**, pois elas são nacionais ou étnicas. Por exemplo, na *Anglio* (Inglaterra) a língua principal é la **angla** (inglês), e no *Japanio* (Japão), a língua principal é la **japana** (japonês).

Usamos o artigo **la** com os nomes de línguas porque quando dizemos, por exemplo, “*Mi parolas la francan*” (Eu falo francês), na verdade é uma forma reduzida de “*Mi parolas la francan lingvon*” (Eu falo a língua francesa). Porém línguas como o Esperanto, que não são associadas a algum país ou povo, geralmente terminam em **-o**, e não levam **la**.

Outras línguas construídas terminam em **-o** pela mesma razão. É por isso que dizemos “*Mi parolas Esperanton*” (Eu falo Esperanto) ou “*Mi ne parolas Volapukon*” (Eu não falo Volapük). Alguns acham que o mesmo deveria se aplicar às línguas mortas como **latino** (latim) e **sanskrito** (Sânscrito).

5) Não é incomum usar, em Esperanto, um adjetivo por si só, quando o substantivo pode ser subentendido no contexto. Por exemplo – “*Mi prenos la ruĝan!*” (Levarei o vermelho!); “*Kiam estas multaj libroj, mi elektas la plej dikajn*” (Quando há muitos livros, eu escolho os mais grossos).

TABELA DOS CORRELATIVOS:

Correlativos são criados por meio de um sistema de combinação silábica bastante lógica.

Tal sistema consiste em 5 sílabas iniciais que se combinam com 9 sílabas finais, formando assim 45 palavras. Tais palavras guardam uma determinada e estreita relação entre si.

Os determinativos terminados em “**u**”, “**a**” ou “**es**” podem vir, ou não, acompanhados de substantivo; aos terminados em “**o**” não podem acompanhar substantivos.

<i>Silaba Inicial</i>	<i>Sentido</i>	<i>Sílaba Final</i>	<i>Sentido</i>
ki-	interrogativos e relativos	-o	coisa indefinida
ti-	demonstrativos	-u	indivíduo; coisa definida
i-	indefinidos	-a	qualidade
çi-	coletivos	-el	modo; maneira
neni-	negativos	-e	lugar
		-am	tempo
		-om	quantidade
		-al	causa; motivo
		-es	posse

Juntos eles formam a seguinte tabela:

	<i>KI-</i>	<i>TI-</i>	<i>I-</i>	<i>ÇI-</i>	<i>NENI-</i>
-O	kio o que; que coisa	tio aquilo; isso	io algo; alguma coisa	çio tudo; cada coisa	nenio nada
-U	kiu qual; que; quem	tiu aquele; esse	iu alguém; algum	çiu todo; cada	neniu ninguém; nenhum
-A	kia de que tipo, espécie	tia tal; tal tipo	ia de algum tipo	çia de todo tipo	nenia de nenhum tipo
-EL	kiel como; de que modo	tiel assim; tão	iel de algum modo	çiel de todo modo	neniel de nenhum modo
-E	kie onde	tie ali, lá	ie em algum lugar	çie em todos os lugares	nenie em nenhum lugar
-AM	kiam quando	tiam nesse tempo	iam algum dia	çiam sempre	neniam nunca
-OM	kiom quanto (s)	tiom tanto	iom um pouco	çiom tudo	neniom nada
-AL	kial por que	tial por isso	ial por algum motivo	çial por todos os motivos	nenial por nenhum motivo
-ES	kies de quem; cujo	ties deste	ies de alguém	çies de todos	nenies de ninguém

EXERCÍCIOS

01 – Leia o texto e traduza, prestando atenção aos correlativos:

Vortareto

alligi – atar; amarrar
alproksimiĝi – aproximar-se
alveni – chegar
ankoraŭ – ainda
antikva – antigo
antaŭ ol – antes que
dio – deus; divindade
dubi – duvidar
ekzameni – examinar
elpreni – tirar
estonta – futuro; vindouro
glavingo – bainha
glavo – espada
Gordio – Górdio
grade – gradualmente
gvidisto – guia
jugo – jugo
ĵus – nesse instante

kamparano – camponês
klini – inclinar; dobrar
kompreneble – naturalmente
konduki – conduzir; levar
kontraŭ – contra
kredi – acreditar; crer
kvankam – embora
ligaĵo – fardo
ligi – atar; amarrar
militado – ataque
morto – morte
nomi – nomear
nuntempe – atualmente
ofero – oferta
okaze – na ocasião
peza – pesado
rakonti – contar
regato – súdito
regi – reger; governar

reĝo – rei
reĝolando – reino
rekoni – reconhecer
rekte – em linha reta
rigardadi – contemplar
sankta – santo; sagrado
subite – de repente
superi – superar
ŝnurego – cabo; corda grossa
tagiĝo – o amanhecer
tranĉi – cortar
tuj – imediatamente
utila – útil
venki – vencer
veturi – viajar
vidindaĵo – curiosidade
zorge – cuidadosamente

LA GORDIA LIGAĴO

Unufoje en antikva tempo la regatoj de **iu** reĝolando en Azio ne havis reĝon. Ne sciante **kion** fari, ili demandis de la dioj.

La dioj respondis, "**Kiu** ajn venos unue en nian sanktan templon hodiaŭ, por fari oferojn, estos via reĝo." Okaze kamparano nomita Gordio venis al la templo, ĵus post la tagiĝo. La regatoj tuj rekonis la estontan reĝon, kvankam li veturis sur peza malbela veturilo. Salutinte la surprizitan kamparanon, oni nomis lin reĝo. Decidinte fari dankoferon al la dioj, Gordio metis en la templon la veturilon mem sur **kiu** li tien veturis, antaŭ ol li komencis regi **kiel** la nova reĝo. La jugo estis alligita per granda ligaĵo el ŝnurego. Post la morto de Gordio oni grade komencis kredi **ion** tre interesan pri **tio**. Oni diris ke tiu, **kiu** povos **iel** ajn malligi **tiun** ligaĵon, fariĝos reganto super ĉiuj reĝoj de Azio.

Post kelkaj jaroj Aleksandro Granda decidis fari grandan militadon kontraŭ Azio, kaj alproksimiĝis al la lando **kie** estis reginta Gordio. **Kiam** li demandis, "**Kio** estas ĉi **tie** la plej interesa vidindaĵo?" oni rakontis al li **tion**, **kion** oni diras pri la ŝnurega ligaĵo sur la veturilo de Gordio. Kompreneble Aleksandro deziris fari **ion** ajn utilan por venki Azion, **tial** li tuj venigis gvidiston por konduki lin al la templo. Alveninte **tien**, li zorge rigardadis la ligaĵon, kaj ekzamenis la ŝnuregon el **kiu** ĝi estis farita. **Tiam**, elpreninte sian glavon el la glavingo, subite kliniĝante li rekte tranĉis la tutan ligaĵon. "**Nenio** estas pli facila ol **tio**," li diris, "kaj nun mi ne dubas ĉu mi certe regos super **ĉiuj** reĝoj de Azio." Pro **tio**, **kion** faris Aleksandro Granda, oni ankoraŭ nuntempe diras, **kiam iu** ajn superas malfacilaĵon per **kia** ajn subita metodo, "Li tranĉis la gordian ligaĵon."

02 – Complete as frases utilizando os correlativos em **A, U e O**:

- a) mensogis al vi. (*Alguém mentiu para você.*)
- b) helpo estos bonvena. (*Qualquer ajuda será bem-vinda.*)
- c) estas via nomo? (*Qual é o teu nome?*)
- d) Ĉu vi havas rilaton al la afero? (*Você tem alguma espécie de relação com o assunto?*)
- e) Kampo transpasis kaj kie loĝas. (*Campo o qual ninguém atravessou e onde não mora ninguém.*)

- f) Ĉu estas via amiko? (*Este é teu amigo?*)
- g) estas al vi? (*O que há com você?*)
- h) vortojn mi neniam aŭdis. (*Palavras desta espécie eu jamais escutei.*)
- i) estas tiel grava. (*Nada é tão importante assim.*)
- j) Ekzistis floro, similus al (*Não existia qualquer espécie de flor, que fosse semelhante àquela.*)
- k) Kiam vi ekparolis, ni esperis aŭdi novan. (*Quando você começou a falar, esperávamos ouvir algo novo.*)
- l) parolas al / kun vi? (*Quem está falando com você?*)
- m) Mebloj kaj vestoj , estis en la domo. (*Móveis e roupas, tudo estava na casa.*)
- n) estis ili parolis al la Faraono. (*Isto foram eles que falaram ao Faraó.*)
- o) Li pli ŝatas ŝin, ol alian. (*Ele gosta mais dela do que de qualquer outra.*)

03 – Complete as frases utilizando os correlativos em ES, E, AM:

- a) Ili atentis pri parolado. (*Eles prestam atenção na fala de alguém.*)
- b) domon vi luis? (*Você alugou a casa de quem?*)
- c) Kiu transpasos la landlimon, vivo estos savita. (*Aquele que atravessar a fronteira, a vida dele estará salva.*)
- d) E-o estas propraĵo. (*O Esperanto não é propriedade de ninguém.*)
- e) Pripeti helpon. (*Pedir a ajuda de todos.*)
- f) mi perdis mian esperantan brustpinglon. (*Em algum lugar eu perdi o meu broche do Esperanto.*)
- g) estas miaj amikoj. (*Onde estão os meus amigos?*)
- h) Kion vi faras ? (*O que você está fazendo?*)
- i) E-o estas en la mondo. (*O Esperanto está em todos os lugares do mundo.*)
- j) ni trovos tiom facilan lingvon. (*Em nenhum lugar nós encontraremos uma língua tão fácil.*)
- k) ni rekontiĝos denove. (*Um dia nós nos encontraremos novamente.*)
- l) vi revenos domon? (*Quando você voltará para casa?*)
- m) Marko venis ĉi tien, ni multe konversaciis. (*Quando Marco veio até aqui, então nós conversamos muito.*)
- n) Pri tio, mi diras la saman aferon. (*Sobre isto, sempre digo a mesma coisa.*)
- o) ni forgesos lian vizaĝon. (*Nunca esqueceremos o rosto dele.*)

04 – Complete as frases utilizando os correlativos em AL, EL, OM:

- a) Ĉu Marta estas bela? (*Marta é assim tão bela?*)
- b) Ŝi eksplodas. (*Ela explode por qualquer motivo.*)
- c) Ĉu vi volas da akvo? (*Você quer um pouco de água?*)
- d) Ŝi ne havas da pacienco. (*Ela não tem tanta paciência.*)
- e) li strebis atingi la celon. (*Por todos os modos ele tentou alcançar o objetivo.*)
- f) li ne venis. (*Por algum motivo ele não veio.*)
- g) Ĉu vi kredas tion? (*Você de algum modo acredita nisso?*)
- h) Li ne povis eliri , ke li ne trovis la ŝuojn. (*Ele não pôde sair, porque ele não encontrou os sapatos.*)
- i) Mi tion intencis. (*Eu de nenhum modo tive a intenção disto.*)
- j) vi sukcesis tion fari? (*Como você conseguiu fazer isto?*)
- k) Ŝi volis el la tirkesto. (*Ela quis toda a quantidade [tudo] do que estava na gaveta.*)
- l) Mi ne scias ŝi ridas. (*Eu não sei por que motivo ela ri.*)
- m) Ĉu ili venis ĉi tien ? (*Eles vieram até aqui por nada [por motivo nenhum]?*)
- n) da mono ni bezonas? (*De quanto dinheiro nós precisamos?*)
- o) Ili prenis el la iloj de la skatolo. (*Eles não pegaram qualquer quantidade dos instrumentos da caixa – [nenhuma quantidade].*)

05 – Traduza o texto 8:

Leciono 9 – ŜATOKUPOJ

Vortareto

akvo – água
al – a; para
bicikli – andar de bicicleta
ĉefe – principalmente
filmo – filme
fiŝaĵo – peixe (carne)
iufoje – algumas vezes
kaj... kaj – tanto... quanto
kanti – cantar

kuiiri – cozinhar
legi – ler
lerni – aprender; estudar
ludi – jogar; brincar
muziko – música
naĝi – nadar
ofte – frequentemente
okupo – ocupação
plaĉi – agradar

ŝatokupo – hobby;
passatempo
spekti – assistir a
sporto – esporte
teniso – tênis
vegetare – vegetarianamente
viando – carne

Teksto 9

Ana ŝatas kanti.
Ŝi ofte kantas. Kaj ŝi bone kantas!
Kanti estas ŝia ŝatokupo.
Ŝi ankaŭ ŝatas ludi tenison kaj bicikli.
Do, Ana estas kaj muzikema kaj sportema.
Al Ana ankaŭ plaĉas legi librojn kaj spekti filmojn.
La gefratoj de Ana ofte naĝas.

Ili tre ŝatas ludi en akvo.
 Ŝatokupo de la patrino de Ana estas lerni lingvojn.
 Ŝi jam bone parolas sep lingvojn!
 La patro de Ana ne ŝatas lerni novajn lingvojn.
 Lia ŝatokupo estas kuirado. Ĉefe li kuiras vegetare, sed iufoje li kuiras ankaŭ fiŝaĵon kaj viandon.

Questionário Texto 9:

- 1) Ĉu Ana estas sportema?
- 2) Kion Ana ŝatas ludi?
- 3) Kiom da lingvoj parolas la patrino de Ana?
- 4) Ĉu vi havas ŝatokupon?
- 5) Ĉu vi bone kantas?
- 6) Kion vi ŝatas kuiri?

Punktoj Gramatikaj

01) -EM-: Sufixo que indica característica, inclinação, tendência a algo. Ex.:

- muzik**EMa** (amante da música)
- sport**EMa** (pessoa que gosta de esportes; amante dos esportes)
- danc**EMa** (pessoa que gosta de dançar)
- mort**EMa** (mortal)
- parol**EMa** (tagarela)

ema – propenso

emi – estar propenso a

emo – tendência; inclinação

02) -AD-: Sufixo para indicar ação simples, ação continuada ou prolongada, ação repetida. Ex.:

- broso (escova) – bro**sADo** (escovadela)
- ĝardeno (jardim) – ĝarden**ADo** (jardinagem)
- paroli (falar) – parol**ADo** (discurso)
- pafi (atirar) – paf**ADo** (tiroteio)

Observação: Este sufixo também denomina algumas ciências, artes ou capacidades:

- a) Li kantas tre belan kanton – Ele canta uma bela canção.
 b) La kant**ADo** estas tre bela okupo. – O cantar [*a arte do canto*] é uma ocupação muito bonita.

“**KantADo**” não significa a ação continuada de cantar, porém *a arte* ou *a ocupação do canto*, o que não necessariamente precisa ser uma ação continuada; por isso a palavra “*ocupação*” aparece como *okupo*, e não como *ocupado*, o que, pois, denotaria a ideia de uma ação contínua.

Similarmente das capacidades:

- Leg**ADo** (leitura)
- Skrib**ADo** (o escrever)
- Aŭd**ADo** (audição; o ouvir)⁹

⁹ Dependendo do contexto poderá significar a ação continuada de assistir com os ouvidos.

- Vid**ADo** (visão)
- Vol**ADo** (o querer)
- Flar**ADo** (olfato)

03) “**Ŝati**” e “**plaĉi**” expressam inclinações, porém suas estruturas são diferentes numa oração. O significado será o mesmo.

- | | | |
|--|---|--|
| • Mi ŝatas kanti. (Eu gosto de cantar.) | – | Kanti plaĉas al mi. (Eu gosto de cantar.) |
| • Li ŝatas ŝin. (Ele gosta dela.) | – | Ŝi plaĉas al li. (Ele gosta dela.) |

04) “**foje**” tem muitas formas compostas que são apenas variações na ideia básica de “**às vezes**”:

- | | |
|---|---|
| • foje – uma vez; um dia; outrora | • iufoje – às vezes; algumas vezes |
| • fojfoje – de vez em quando | • kelkfoje – às vezes; algumas vezes |
| • iafoje – às vezes; algumas vezes | • multfoje – muitas vezes |

05) -**UJ**:- sufixo que indica:

a) continente total; recipiente:

- | | | |
|-------------------|---|--------------------------------------|
| • abelo (abelha) | – | abel UJO (colmeia) |
| • mono (dinheiro) | – | mon UJO (carteira) |
| • papero (papel) | – | paper UJO (pasta para papéis) |
| • salo (sal) | – | sal UJO (saleiro) |
| • sukero (açúcar) | – | suker UJO (açucareiro) |

b) árvore ou arbusto em relação ao fruto ou à flor:¹⁰

- | | | |
|--------------------|---|-------------------------------|
| • gujavo (goiaba) | – | gujav UJO (goiabeira) |
| • oranĝo (laranja) | – | oranĝ UJO (laranjeira) |
| • pomo (maçã) | – | pom UJO (macieira) |
| • rozo (rosa) | – | roz UJO (roseira) |

c) país em relação aos habitantes:¹¹

- | | | |
|-------------------------|---|------------------------------|
| • anglo, angla (inglês) | – | Angl UJO (Inglaterra) |
|-------------------------|---|------------------------------|

¹⁰ Também se juntam aos termos “-arbo” e “-arbeto” à raiz, no lugar de -**UJ**- Ex: pom**ARBO**; roz**ARBETO**.

¹¹ a) Este sufixo deve ser usado apenas para os países da Europa e da Ásia, pois aqueles países, originalmente, receberam os seus nomes em razão dos nomes de determinados povos neles contidos, tal que -**UJ**- será o continente dos ingleses, dos franceses etc. Note que, no caso do Brasil, não existia previamente o povo dos brasileiros ou “brasilese”, mas sim uma árvore a que se dava o nome de pau-brasil, isto é, da cor da brasa, avermelhada.

b) A tendência atual é usar a terminação -**IO** em vez de -**UJO**-.: Angl**IO**; Franc**IO**; German**IO**.

Também podendo-se acrescentar a palavra “**lando**” à raiz: Franc**LANDO**; German**LANDO**.

Há países de cujos nomes “**lando**” faz parte integrante, não se tratando, portanto, de acréscimo à raiz primitiva: *Finnlando* (Finlândia); *Irlando* (Irlanda); *Islando* (Islândia); *Nederlando* ou *Holando* (Neerlândia ou Holanda. Nestes, evidentemente, a parte “**lando**”, por sua vez, não pode ser substituída.

c) Além de outros, terminam em -**IO** os seguintes nomes: Aŭstral**IO**; Az**IO**; Boliv**IO**; Bosn**IO**; Ĉil**IO**; Hait**IO**; Indonez**IO**; Lib**IO**; Meksik**IO**; Sir**IO**; Tuniz**IO**.

d) Há outros nomes de países sem sufixo próprio: Argentino; Bazilo; Egípto; Egíptujo; Kanado; Paragvajo; Urugvajo; Usono.

- franco, franca (francês) – Franc**UJO** (França)
- germano, germana (alemão) – German**UJO** (Alemanha)
- italo, itala (italiano) – Ital**UJO** (Itália)
- japano, japana (japonês) – Japan**UJO** (Japão)

UJo – recipiente; contêiner; vasilha.

EXERCÍCIOS

01 – Usando o sufixo **-EM-** a um radical, diga o significado das palavras:

- a) labori (trabalhar) – _____
- b) babili (conversar; bater papo) – _____
- c) dormi (dormir) – _____
- d) manĝi (comer) – _____
- e) timi (temer; recear) – _____

02 – Usando o sufixo **-AD-** ao radical, diga o significado das palavras:

- a) iri (ir) – _____
- b) martelo (martelo) – _____
- c) telefono (telefone) – _____
- d) floro (flor) – _____
- e) lerni (aprender) – _____

03 – Complete as seguintes frases utilizando as formas em **-UJ-**:

- a) Ne ĉia estas arbo. (Nem toda espécie de planta frutífera é uma árvore. – *frukto*)
- b) Tio estas por kameloj. (Aquilo é umm bebedouro para camelos. – *trinki*)
- c) Purigu la, mi petas. (Limpe os cinzeiros, por gentileza. – *cindro*: cinza)
- d) En mia bieno mi havas kaj (Em minha fazenda tenho abacateiros e parreiras. – *avokado*: abacate; *vinbero*: uva)
- e) Mi vizitis kaj pasintjare. (Visitei a Rússia e a Turquia no ano passado. – *ruso*, *rusa*: russo; *turko*, *turka*: turco)

04 – Traduza o texto 9:

Leciono 10 – KION VIŜATAS FARI?

Vortareto:

amuza – divertido
angla – inglês
dum – durante
kelkfoje – às vezes
komputilo – computador
kredi – acreditar; crer
kune – juntos
libera – livre

libertempo – tempo livre
ludi – brincar; jogar
ludo – jogo
monto – montanha
montobiciklo – mountainbike
nekredebla – inacreditável
povi – poder
preferi – preferir

problemo – problema
same – igualmente
sen – sem
senprobleme – sem problema
sia – seu, sua, dele, dela
vere – realmente (êu vere? – verdade? / sério?)

Teksto 10:

Ana: Kion vi ŝatas fari?

Mark: Mi ŝatas fari multajn aferojn.

Ana: Ĉu vi ŝatas bicikli?

Mark: Jes, sed mi ne havas biciklon ĉi tie.

Ana: Mi havas du biciklojn, unu montobiciklon kaj unu urbobiciklon.

Mark: Bonege. En Svislando ankaŭ mi havis montobiciklon.

Ana: Ni povus kune bicikli iam, se vi ŝatus.

Mark: Jes, volonte.

Ana: Mi ĝojas.

Mark: Kion alian vi ŝatas fari dum via libertempo?

Ana: Mi ankaŭ ŝatas ludi tenison kaj kanti.

Mark: Same mi! Sed mi ne tre bone kantas.

Ana: Kion alian vi ŝatas fari?

Mark: Mi tre ŝatas ludi komputilludojn.

Ana: Ĉu vere?

Mark: Jes, estas vere amuze.

Ana: Kio pri libroj? Ĉu vi ŝatas legi librojn?

Mark: Kelkfoje, kiam mi havas tempon kaj trovas iun bonan libron.

Ana: En kiu lingvo vi preferas legi?

Mark: En la franca. Ankaŭ en la angla kaj la germana mi povas senprobleme legi.

Ana: Tre bone. Do, vi estas kaj sportema kaj kantema kaj lingvema.

Mark: Jes, sed mi plej ŝatas ludi komputilludojn!

Ana: Nekredeble.

Questionário Texto 10:

- 1) Ĉu Mark ŝatas bicikli?
- 2) Kiom da bicikloj havas Ana?
- 3) Kion Mark ŝatas fari dum sia libertempo?
- 4) Ĉu Ana ŝatas ludi komputilludojn?
- 5) Kion vi ne ŝatas fari?

Punktoj Gramatikaj:

01) -IL-: Sufixo que mostra o instrumento pelo qual se executa a ação expressa pela raiz. Tem o sentido de “instrumento, aparelho, utensílio, ferramenta”. Ex.:

• komputi (computar)	–	komput IL o (computador)
• kombi (pentear)	–	komb IL o (pente)
• naĝi (nadar)	–	naĝ IL o (barbatana)
• tranĉi (cortar)	–	tranĉ IL o (faca)
• balai (varrer)	–	bala IL o (vassoura)

Ilo – ferramenta; instrumento; meio

02) -EBL-: Sufixo que indica que uma ação particular é possível ou indica capacidade passiva. E.g.:

• legi (ler)	–	leg EBL a (legível)
• kredi (acreditar)	–	kred EBL a (crível)
• vidi (ver)	–	vid EBL a (visível)
• travidi (ver através de)	–	travid EBL a (transparente)

• fari (fazer) – far**EBLa** (realizável)

EBLa – possível
EBLe – possivelmente; talvez
EBLeco – possibilidade
EBLi – ser possível
EBLo – possibilidade
EBLigi – possibilitar

03) -ID-: sufixo que indica filhote; descendente; filho de:

a) Filhote:

• ĉevalo (cavalo) – ĉeval**IDo** (potro)
• porko (porco) – pork**IDo** (leitão)

b) Descendente de família ou raça:

• latina lingvo (língua latina) – latin**IDaj** lingvoj (línguas neo-latinas)
• Izraelo (Israel – Jacó) – Izrael**IDoj** (israelitas)

c) Filho de:

• princo (príncipe) – princ**IDo** (filho do príncipe)
• reĝo (rei) – reĝ**IDo** (filho do rei)
• Paŭlo (Paulo) – Paŭl**IDo** (filho de Paulo)

Ido – filho; filhote; descendente.

Observações:

04) A ordem das palavras em Esperanto é bem flexível, porém às vezes a ordem carrega significado. Tanto **ankaŭ mi** quanto **mi ankaŭ** significam “*Eu também*”, porém em **ankaŭ mi** a palavra **ankaŭ** se relaciona a **mi**, ao passo que em **mi ankaŭ**, ela se relaciona ao que vem em seguida:

• **ankaŭ mi** havas biciklon. [Você tem uma bicicleta e] eu também tenho uma bicicleta.
• **Mi ankaŭ** havas biciklon. [Eu tenho um carro e] também tenho uma bicicleta.

05) Você aprendeu que os **adjetivos** descrevem os substantivos, e que os **advérbios** descrevem verbos (entre outras coisas).

Isto pode afetar orações em Esperanto de certa forma que você não estará esperando! No texto, falando sobre jogos de computador, Mark diz **Jes, estas vere amuze** (*Sim, é realmente divertido*). Note que ele diz **amuze** e não **amuza**. Sua oração não tem substantivo para descrever, portanto ele só pode descrever o verbo. É por isso que ele usa um advérbio. Se ele incluísse um substantivo na oração, como **tio**, isso alteraria a gramática, e ele usaria a forma de adjetivo **amuza**: **Jes, tio estas vere amuza** (*Sim, isso é muito divertido*). Você verá isto acontecendo em muitas outras circunstâncias quando não houver substantivo na oração: **Nekredeble!** (*Incrível!*); **Ĉu vere?** (*Verdade?*); **Bone!** (*Bom!*). Como você pode ver, em Esperanto usamos um bocado de advérbios!

06) sen/problem/e: Uma combinação de **sen** (*sem*), **problem-** (*problema*) e **-e**. Portanto **senprobleme** significa “*sem problema*”.

EXERCÍCIOS

01 – Diga o nome dos objetos:

- | | | |
|----------------------------------|---|-------|
| a) fajlo (fajli – lixar) | – | _____ |
| b) ŝlosilo (ŝlosi – trancar) | – | _____ |
| c) kudrilo (kudri – costurar) | – | _____ |
| d) hakilo (haki – picar; rachar) | – | _____ |
| e) segilo (segi – serrar) | – | _____ |

02 – Utilize o sufixo **-ebl-** e traduza as palavras:

- | | | |
|-----------------------------|---|-------|
| a) (porti – carregar) | – | _____ |
| b) (trinki – beber) | – | _____ |
| c) (manĝi – comer) | – | _____ |
| d) (kompreni – compreender) | – | _____ |
| e) (flekxi – flexionar) | – | _____ |

03 – Para cada animal dado abaixo, crie seu filhote em esperanto, tentando dar seu nome em português:

- | | | |
|-----------------------|---|-------|
| a) aglo (águia) | – | _____ |
| b) ansero (ganso) | – | _____ |
| c) fiŝo (peixe) | – | _____ |
| d) kanguruo (canguru) | – | _____ |
| e) rano (rã) | – | _____ |

04 – Traduza o texto 10.

Leciono 11 – VETERO

Vortareto

aero – ar	iom – um pouco, um tanto	somero – verão
aŭtuno – outono	kontrasto – contraste	suno – sol
brili – brilhar	kun – com	super – acima de
ĉirkaŭ – aproximadamente	laŭ – de acordo com	tiam – então, nesse tempo
espereble – tomara que	morgaŭ – amanhã	tro – demais
espero – esperar	neĝi – nevar	varma – quente
fakte – de fato	nun – agora	vetero – tempo (atmosférico)
freŝa – fresco	perfekte – perfeito	vintro – inverno
grado – grau	pluvi – chover	
hieraaŭ – ontem	printempo – primavera	

Teksto 11

Estas vintro nun en Novjorko. Pluvas... Hieraaŭ neĝis kaj hodiaŭ pluvas. Bona vetero por legi libron...

Espereble la suno brilos morgaŭ, ĉar tiam mi biciklos kun amiko. Fakte al mi pli plaĉas somero ol vintro.

Dum somero ofte estas varma vetero ĉi tie. Mi tre ŝatas, kiam la suno brilas! Kiam estas ĉirkaŭ 25 gradoj celsiaj (77 farenhejtaj) estas perfekte, laŭ mi. Por mi estas tro varme, kiam estas sune kaj super 30 gradoj celsiaj (86 farenhejtaj). Post somero estas agrable, kiam aŭtuno venas kun freŝa aero kaj iom da pluvo. Kaj post vintro estas agrable, kiam printempo venas kun pli varma vetero.

Kontrastoj bonas...

Suno venu!

Questionário Texto 11:

- 1) Kia estas la vetero ĉe Ana?
- 2) Kia estas la vetero dum vintroj ĉe vi?
- 3) Ĉu vi ŝatas someron?
- 4) Kia estas la vetero ĉe vi hodiaŭ?
- 5) Kiu estas via preferata sezono? Kial?

Punktoj Gramatikaj

01) pluvas, neĝas: Para dizermos que “*Está chovendo*”, “*Está nevando*”, usamos simplesmente “**Pluvas**”, “**neĝas**”. Como em Português, não há a necessidade de sujeito por se tratar de verbos impessoais. Ex.:

- Estis agrable renkonti vin. - Foi legal te encontrar.
- Kostas nenion provi. - Não custa nada tentar.
- Ne gravas. - Não é importante / Não importa.

02) Ĉu: Como sabe, usamos **ĉu** para formarmos uma pergunta tendo como resposta “*sim* ou *não*”. **Ĉu** também é usado para relatar tais perguntas indiretamente. Traduz-se por “*se*”. Ex.:

- Mark demandis, **Ĉu** Ana volas veni. - Mark perguntou se a Ana queria vir.
- Mi pripensas, **Ĉu** mi iru aŭ ne. - Estou pensando se devo ir ou não.
- Si ne diris, **Ĉu** tio gravas aŭ ne. - Ela não disse se era importante ou não.

03) -A kaj -E: Pode parecer difícil saber quando usar a terminação **-A** (forma do adjetivo) e quando usar a terminação **-E** (forma do advérbio). Por exemplo:

- La vetero estas varm**A**. (“Varm**A**” descreve o substantivo “*vetero*”, portanto, um adjetivo.)
- Estas tro varm**E** ĉi tie. (“Varm**E**” descreve uma circunstância, portanto, um advérbio.)

✓ Resumindo, se estiver descrevendo um substantivo, use **-A**; se estiver descrevendo um verbo, uma oração, uma situação, uma locução prepositiva, use **-E**. Eis alguns exemplos:

- Ŝia rakonto estas interes**A**. - Sua estória é interessante.
- Ŝi rakontas interes**E**. - Ela narra estórias de uma forma interessante.
- Tio estas bon**A**. - Isso é bom.
- Li estas bon**A**. - Ele é bom.
- Li estas bon**E**. - Ele está bem.
- Estas bone ĉi tie**E**. - Está bom aqui.
- La ĉambro estas varm**A**. - O quarto está quente.
- En la ĉambro estas varm**E**. - Está quente no quarto.

04) -ING-: Sufixo indicando um objeto no qual outro se encaixa parcialmente, ou seja o continente parcial para não fazer uso dele.

- kandelo (vela) - kandel**INGo** (castiçal)
- cigaro (charuto) - cigar**INGo** (piteira)
- piedo (pé) - pied**INGo** (estribo)
- glavo (espada) - glav**INGo** (bainha)

- | | | |
|---------------------|---|--------------------------------|
| • ŝraŭbo (parafuso) | - | ŝraŭb INGo (porca) |
| • kraĵono (lápis) | - | kraĵon INGo (lapiseira) |

INGo – estojo; bainha.

Observação: Observe as diferenças entre “-ING-” e “-UJ-”:

- | | |
|--------------------------------|----------------------------------|
| • kandelujo (caixa para velas) | • cigarujo (caixa para charutos) |
| • kandelingo (castiçal) | • cigaringo (piteira) |

05) -AR-: Sufixo indicando coleção, conjunto de objetos ou seres da mesma espécie formando um todo, podendo referir-se à totalidade da espécie ou uma parte dela:

- | | | |
|-------------------------------|---|--|
| • homo (homem – ser humano) | - | homaro (humanidade) |
| • esperantisto (esperantista) | - | esperantistaro (comunidade esperantista) |
| • fiŝo (peixe) | - | fiŝaro (cardume) |
| • amiko (amigo) | - | amikaro (grupo de amigos) |
| • nomo (nome) | - | nomaro (lista de nomes) |

Observação: Poder-se-á exprimir somente a ideia ocasional ou dispersa de objetos ou seres de uma mesma espécie usando-se o sufixo “-AR-” como raiz autônoma, isto é, **aro**:

- | | | |
|----------------------------|---|---|
| • aro da knaboj | - | um grupo de garotos |
| • aro da amikoj | - | um certo grupo de amigos ou número limitado de amigos
(<i>não se trata da totalidade de amigos que alguém possa ter</i>) |
| • teorio de la aroj | - | teoria dos conjuntos |

EXERCÍCIOS

01 – Reescreva as frases utilizando advérbios. Siga o modelo:

Modelo: Ili manĝas en **rapida** maniero. → Ili manĝas **rapide**.

- a) Ŝi kisis lin en amika maniero. _____
- b) Ni forkuris en kuraĝa maniero. _____
- c) Mi uzas la komputilon en profesia maniero. _____
- d) Vi fermis la pordon en forta maniero. _____
- e) Claudja rakontas historiojn en bela maniero. _____

02 – Complete com as devidas terminações:

-as (presente)	-oj (substantivo plural)
-is (passado)	-on (substantivo singular acusativo)
-os (futuro)	-ojn (substantivo plural acusativo)
-u (imperativo)	-a (adjetivo singular)
-i (infinitivo)	-aj (adjetivo plural)
-e (advérbio)	-an (adjetivo singular acusativo)
-o (substantivo singular)	-ajn (adjetivo plural acusativo)

- a) Petro kaj Ŝejla est _____ nun en la preĝej _____. (*Pedro e Sheila estão agora na igreja.*)
- b) Mi skrib _____ al li baldaŭ. (*Escreverei a ele em breve.*)

- c) Mi fort____ am____ mi____ amik____ . (Eu fortemente amo meus amigos.)
 d) La lernant____ bon____ kompren____ ili____ lecion____ . (Os alunos compreenderam bem a sua lição.)
 e) La gardist____ forkonduk____ la malliberul____ al la malliberej____ . (Os guardas levaram o prisioneiro à prisão.)
 f) Aŭskult____ atent____ mi____ du demand____ ! (Escute atentamente minhas duas perguntas!)
 g) La urbo est____ plen____ . (A cidade estará cheia.)
 h) Ne gustum____ la manĝaj____ tre rapid____ . (Não saboreie a comida muito rápido.)
 i) Ĉu vi pov____ literum____ esperant____ vort____ tre rapid____ ? (Você pode soletrar palavras do esperanto muito rápido? **Dica:** transforme “esperanto” em adjetivo)

03 – Crie palavras com o sufixo **-ING-**. Em seguida dê o significado em português:

- a) fingro (dedo) - _____
 b) ovo (ovo) - _____
 c) ŝtopilo / konektilo (plug) - _____
 d) kruro (perna) - _____

04 – Crie palavras com o sufixo **-AR-**. Depois, dê os significados em português.

Exemplo: horo (hora) → hor**AR**o (horário, coleção de horas)

- a) demando (pergunta) → _____
 b) vagono (vagão) → _____
 c) vorto (palavra) → _____
 d) ŝtupo (degrau) → _____
 e) arbo (árvore) → _____
 f) abelo (abelha) → _____
 g) stelo (estrela) → _____

05 – Traduza o texto 11:

Leciono 12 – BICIKLADO

Vortareto:

antaŭ – antes de; diante de
antaŭe – pimeiramente; antes
antaŭen – em frente; avante
atingi – atingir; alcançar;
 chegar a
bezoni – precisar (de)
blovi – soprar
ĉiu – cada; todo
dekstre – à direita
devi – dever
eble – talvez

ek – começar a
gravi – ser importante
jam – já
ke – que
kelkfoje – às vezes
kien – aonde; para onde
koni – conhecer
kutime – geralmente
montri – mostrar
parko – parque
pensi – pensar; achar

perfekta - perfeito
pli – mais
proponi – propor
rekte – direto; diretamente
sekvi – seguir
soni – soar
suno – sol
unue – primeiramente;
 primeiro
vento – vento

Teksto 12

Mark: Kiom agrabla vetero hodiaŭ!

Ana: Jes, perfekta por biciklado. Sune kaj ne tre vente.

Mark: Mi pensas, ke blovos pli poste.

Ana: Eble. Sed ne gravas.
Mark: Kien ni biciklu?
Ana: Mi proponas, ke ni biciklu al Centra Parko.
Mark: Sonas bone.
Ana: Ĉu vi jam estis tie?
Mark: Jes, kelkfoje. Sed mi ne konas ĉiujn partojn de ĝi.
Ana: Mi montros la tutan parkon al vi.
Mark: Bonege! Kiom da tempo ni bezonos por atingi ĝin?
Ana: Kutime mi bezonas ĉirkaŭ kvardek kvin minutojn.
Mark: Ĉu ni ekbiciklu?
Ana: Jes. Iru unue rekte antaŭen kaj poste dekstren.
Mark: Mi pensis, ke ni devas unue iri maldekstren...
Ana: Ne ne. Ĉu vi volas, ke mi biciklu antaŭ vi?
Mark: Jes, bone, mi sekvos vin.

Questionário Texto 12:

- 1) Kien biciklos Ana kaj Mark?
- 2) Ĉu Mark montros la parkon al Ana?
- 3) Kiom da tempo ili bezonos por atingi la parkon?
- 4) Ĉu Ana sekvos Mark?
- 5) Ĉu Ana kaj Mark biciklu unue dekstren?
- 6) Ĉu vi ŝatas bicikli?
- 7) Ĉu vi peferas bicikli aŭ motorbicikli?

Punktoj Gramatikaj

01) EK-: prefixo que indica começo de ação ou momentânea. E.g.:

- | | | |
|--------------------------------|---|--|
| • vidi (ver) | - | EK vidi (avistar) |
| • bicikli (andar de bicicleta) | - | EK bicikli (começar a andar de bicicleta) |
| • dormi (dormir) | - | EK dormi (adormecer) |
| • brilo (brilho) | - | EK brilo (súbito brilho) |

Ek! – Vamos!

02) -N para direção: Vimos anteriormente que a terminação **-N** é usada para indicar o objeto direto, ex: *Mi vidas **vin*** (eu te vejo). A terminação **-N** também pode indicar direção. Ex.:

- | | | |
|---|---|--|
| • kie (onde) | - | kie N (aonde, para onde) |
| • dekstre (direita) | - | dekstre N (para a direita) |
| • Kien vi iros? (Para onde você está indo?) | - | Mi iros hejme N . (Estou indo para casa.) |
| • Ili saltis en la rivero. | - | Eles pulavam dentro do rio. |
| • Ili saltis en la rivero N . | - | Eles pulavam para dentro do rio. |

03) -U para indicar um desejo: Atenção à frase: *Mi proponas ke ni bicikl**U**...* (Sugiro que a gente vá de bicicleta...). Este é um exemplo do uso de **-U** para indicar um desejo ou intenção. Há vários usos no texto como exemplos.

04) -UM-: Sufixo sem sentido definido, usado para derivar palavras cuja relação com a raiz é imprecisa, e que também não podem ser expressas por meio de qualquer outro sufixo:

- | | | |
|-----------------|---|-----------------------------------|
| • butiko (loja) | – | butik UM i (ir às compras) |
|-----------------|---|-----------------------------------|

- gusto (gosto; sabor) – gustUMi (experimental; saborear)
- malvarma (frio) – malvarmUMo (resfriado)
- proksima (próximo) – proksimUMe (aproximadamente)
- plena (cheio) – plenUMi (preencher)

05) DIS-: Prefixo usado com raízes verbais demonstrando distribuição, dispersão, separação ou desunião:

- doni (dar) – DISdoni (distribuir)
- fali (cair) – DISfali (desabar)
- iri (ir) – DISiri (dispersar)
- semi (semear) – DISsemi (disseminar)

EXERCÍCIOS

01 – Usando **EK-** (ação súbita, começo de ação), crie um verbo e um substantivo a partir das raízes dadas, em seguida tente achar uma tradução para ambas as palavras.

Ex: krii (gritar) – ekrii (exclamar) – ekkrio (exclamação)

- a) am- (amar)
- b) bol- (ferver)
- c) Flug- (voar)
- d) ir- (ir)
- e) kant- (cantar)

02 – Corrija as frases quando necessário:

- a) La muso kuris sub la tablo. (O rato correu pra debaixo da mesa.)
- b) La muso kuris sub la tablo. (O rato correu embaixo da mesa.)
- c) Kio vi faros morgaŭ? (O que você vai fazer amanhã?)
- d) Ni iru antaŭe! (Vamos em frente!)
- e) Mi iras en la domo. (Eu caminho dentro de casa.)
- f) Mi vojaĝas en Brazilo. (Viajo no Brasil.)
- g) Mi vojaĝas en Brazilo. (Viajo para o Brasil.)
- h) La patro ordonis, ke mi faru la taskon. (O pai ordenou que eu fizesse a tarefa.)
- i) Mi esperas, ke vi sukcesas. (Espero que você tenha êxito.)

03 – Qual o significado de:

- a) cerbo (cérebro) → cerbumi: _____
- b) cruco (cruz) → crucumi: _____
- c) kolo (pescoço) → kolumo: _____
- d) folio (folha) → foliumi: _____
- e) Komuna (comum) → komununo: _____
- f) mano (mão) → manumo: _____
- g) brako (braço) → brakumo: _____
- h) butono (botão) → butonumi: _____
- i) sapo (sabão) → sapumi: _____

04 – Qual o significado de:

- a) ŝiri (rasgar) → disŝiri: _____

- b) sendi (enviar) → dissendi: _____
 c) rompi (quebrar) → disrompi: _____
 d) floro (flor) → disflori: _____
 e) malfermi (abrir) → dismalfermi: _____

05 – Traduza o texto 12.

Leciono 13 – KION VI FAROS?

Vortareto:

bonŝanca – sortudo
Bostono – Boston (E.U.A.)
Ĉinio – China
demando – pergunta
diveni – adivinhar; achar
do – portanto; assim
eduko – educação
espereble – tomara que
fari – fazer
fariĝi – tornar-se

ĝuste – justamente;
 certamente
ie – algum lugar
ien – para algum lugar
jes ja – sim, de fato
ĵurnalisto – jornalista
kompreneble – claro
kontakto – contato
meza – médio
onklo – tio

pagi – pagar
plano – plano
riĉa – rico
senti – sentir
sola – só; sozinho
somero – verão
studi – estudar
tio – isso, aquilo
verŝajne – provavelmente
vojaĝo – viagem

Teksto 13

Ana: Mark, kion vi faros post la meza lernejo?
Mark: Tio estas tre bona demando!
Ana: Do, vi ne scias, ĉu?
Mark: Mi scias, kion mi ŝatus fari.
Ana: Kion vi ŝatus fari?
Mark: Mi ŝatus labori kiel ĵurnalisto.
Ana: Ĉu vi volas fariĝi ĵurnalisto?
Mark: Jes, ĝuste. Espereble mi fariĝos ĵurnalisto post la somero.
Ana: Sed vi ne havas edukon kiel ĵurnalisto!
Mark: Eduko ne plej gravas. Pli gravas personaj kontaktoj.
Ana: Ĉu vi havas tion?
Mark: Kion?
Ana: Personajn kontaktojn ĉe iu ĵurnalo, kompreneble.
Mark: Jes. Aŭ pli ĝuste, mia patro havas tion.
Ana: Bonŝanca vi estas.
Mark: Ni vidos. Kio pri vi?
Ana: Kio pri mi?
Mark: Kiuj estas viaj planoj post la somero?
Ana: Ne demandu, mi petas.
Mark: Mi divenas, ke vi ŝatus vojaĝi ien.
Ana: Tute prave. Dum la somero mi vojaĝos al Ĉinio.
Mark: Bonege!
Ana: Jes, mi sentas min tre bonŝanca. Mia riĉa onklo pagos la vojaĝon.
Mark: Ĉu vi iros sola?
Ana: Ne, mi iros kun mia Esperanto-amiko el Bostono.
Mark: Kaj post la somero vi studos, ĉu?
Ana: Jes, tio estas mia plano, sed mi tute ne scias kion studi...

Questinário Texto 13:

- 1) Kion ŝatus Mark fari post la meza lernejo?
